

ĈU AZILO POR BAPTO AŬ BAPTO POR AZILO?

Ĉiam pli da ŝtatoj – membroj de EU, kaj ankaŭ Eŭropa Komisiono apogas la opinion de la ŝtatoj de la Grupo V4 – Viŝehrada, ke la plej bona maniero por la haltigo de la migrado el islamaj landoj estas la ŝtopo de la limoj de Unio kaj la helpo al la elmigrintoj en la regionoj de ilia loĝado.

Sed estas timo, ke ilia invito al Germanio, do ankaŭ al Eŭropo, estos abunda je malfacilaĵoj, kiuj estos malsolveblaj enkadre de la devigata juro. Kontraŭe – ĉi demokrazia juro plenigita per la ideologio „multikulti“ faciligas al tiuj enmigrintoj la ankradon en la novan realecon.

Unu el la manieroj por akiri la azilon estas la akcepto de kristanismo. Plej facile kaj plej rekte al protestantismo, kio ĝojigas la evangelianajn episkopojn: ĝis nun malplenaj preĝejoj pleniĝis per konvertiĝintoj el Afriko kaj Proksima Oriento. En unu el berlinaj preĝejoj aldoniĝis mil ducent da ili dum mallonga tempo. Nemirinde, ĉar la protestantaj eklezioj estas ne nur en Germanio, sed ankaŭ en la tuta Eŭropo „politike korektaj“.

Kaj kia estas al tio reago de la islamaj ŝtatoj? Kiel tio eblas, ke anstantaŭ detranĉadi la kapojn de malfideluloj, la islamanoj konvertiĝas al kristanismo? Nu jen. Ĉu ili devus esti punitaj pro la perfido de la religio? Ŝajnas, ke nur en Germanio estas kelkdek

mil da novaj konvertiĝintoj. Kaj ili ĝenerale ne timas la venĝon flanke de islamistoj. Mi tamen timas, ke ĉi tiuj konvertiĝintoj ne agas senripense.

La konvertiĝo al protestantismo estas planita fare de la islama establiĝmento, ĉar tio estas la plej bona maniero por konkerti la okcidenton de Eŭropo. Min ne mirigos, se en estonto okazos, ke ĉi tiuj novaj kristanoj, post ricevo de azilo, montras al mastroj, kia maniere oni povas esti fidela malfidelulo.

Mi volus erari, sed malfacile estas ekredi je la spontanea konvertiĝado de islamanoj al la kristana kredo, escepte nur se la mondo freneziĝus, kaj la islamanoj amase konvertiĝadus al la protestantismo, en la arabaj landoj moskeoj estus trakonstruotaj je preĝejoj, plej bone gotikaj. Estas nur unu problemo: tie ne estas la bonstato nek helpmono en la valuto euro, des pli nek pastoroj kaj pastorinoj, episkopoj kaj episkopinoj, nek predikoj – „multikulti“, ĉar estas la milito, mizero kaj krimo. La kontrabandistoj de elmigrantoj tamen instigados ilin por la transnavigado al Eŭropo per la ebleco akiri rapide azilon. Nu sufiĉas do baptiĝi en la protestanta eklezio.

Krystyna Grzybowska
El la semajna revuo wSIECI, 23-30/2016
Esperantigis: Stanisław śmigielski